

# AVENO 11

**Asocio de Verduloj Esperantistaj** januaro 1994

Karaj ge-AVE-anoj,

mi deziras al Vi ĉian bonon por la Jaro 1995; sanon, pacon kaj feliĉon.

Sano, tio estu: korpa saneco, sufiĉe da bonkvalitaj nutraĵoj, hejma aŭ familia kaj ĝenerale homeca varmo.

Paco, tio estu: bonaj rilatoj inter la homoj kaj inter la grupoj (triboj, gentoj, etnoj, nacioj, popoloj), bonaj rilatoj ankaŭ inter ni, la homoj, kaj la naturo (bestoj kaj plantoj (landaj kaj akvaj)), biotopoj (riveroj, lagoj, arbaroj, pejzaĝoj), grundo (fekunda aŭ ne) kaj aero). Ni konscias, ke ni vivas de aero kaj akvo, de plantoj kaj - se necesas - de bestoj. Kaj ni ne trouzu ilin.

Krome ekzistas la spirita sfero; de tio verŝajne ĉiu havas sian propran konscion kaj religion. Mi opinias, ke ne gravas la nomoj de la religiaj konceptoj aŭ de la filozofioj sur kiuj baziĝas la homaraneca kaj ekologia sinteno. Gravas ke ni respektas la memdecid-rajton de la vivantoj kaj vivontoj al sia propra feliĉo.

---

La aktuala stato de AVE:

Ni estas 63 membroj, plejparte en Eŭropo. Krome ilin ĉi tiu AVENO atingos 29 (malnovajn) interesiĝantojn kaj sufiĉe grandan nombron da homoj aŭ organizoj kies adresojn mi ricevis de Andrzej Zwawa de la Verdaj Brigadoj el Krakovo (ili ricevos apartan slipon por eble membriĝi). Pere de kelkaj de niaj membroj ni havas rilatojn al specialaj aŭ regionaj grupoj, laborante je verd-politika temaro. Ĉi kune vi ricevas la liston de la interŝanĝemuloj, enkrampe informon pri koncerna ĵurnalo aŭ grupo. Se Vi ŝatas, ke ankaŭ Via adreso aŭ grupo estu publikigota en ĉi tiu listo, bonvolu informi min, la sekretario de AVE - adreso troviĝas je la fino.

Ni havas statuson de kunlaboranta faka asocio kun UEA. Avantaĝo estas, ke ni estas menciataj en la UEA-jarlibro sub Ekologio. Tio certe helpas, ke UEA-membroj povas facile trovi AVE-n. Krome ni povas renkontiĝi ankaŭ okaze de la UEA-kongresoj. Informo pri UEA je la venonta paĝo; adreso: *Universala Esperanto Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ, Rotterdam.*

La Europaj Verduloj (konsistante el pli ol 27 Verdaj Partioj), nome la ĝenerala sekretario Leo Cox, ricevas nian bultenon. Bedaŭrinde ili ĝis nun ne agnoskis nin kiel kunlaborantoj. Tamen mi provas teni la kontakton, ĉar certe unu el niaj cel-grupoj estas La Eŭropaj Verduloj.

Ili renkontiĝis en oktobro 1994 en Grekio, sed mi ne scias pri la rezultoj. Se iu de Vi scias, bonvolu informi min.

Pere de elektronika reto (apc-reto "Asocio por Progresemaj Komunikadoj") mi provos atingi ankaŭ la Globalan Verd-Partian Konferenco-Reton.

Kion Fari ?

Ĝenerale mi opinias ke ni diskutu je la venontaj renkontiĝoj pri:
- Uzado de Esperanto kiel komunikilo inter la Verdaj Partioj.
- Informado pri ekologio en Esperantujo.
- Kompreneble Vi rajtas nomumi pliajn temojn.

**2-a Eŭrop-Unia Kongreso:** Ĝi okazos je Pentekosto (2a-6a de junio '95) en Parizo. Mi intencas partopreni. Mi petas la LKK-n pri renkontejo por AVE-diskutrondo je sabato aŭ dimanĉo - respondo ankoraŭ mankas.

**UEA:** AVE, kiel faka kunlaboranto de UEA, havas la eblecon partopreni la UEA-kongreson. Tion ni (almenaŭ mi) volas fari. La 80-a **UEA-kongreso 22a-29a de julio '95 estos en Tampere-o** (Finnlando), do por eŭropanoj atingebla pere de trajno aŭ ŝipo. Mi jam mendis salonon kaj **invitas Vin partopreni nian AVE-diskutrondon en Tampere.**
Mi volonte ŝatus mendi budon por dum-kongresa informo pri AVE; tio kostus 640 nlg-ojn. Kompreneble tio estas tro multe da mono por AVE - niaj donacoj ne estas tiom grandaj. Krome temas pri materialo kaj tempo, do ni ankaŭ bezonas kelkajn AVE-anojn, kiuj estas pretaj disdoni faldfoliojn kaj diskuti kun la kongresanoj pri ekologia politiko. Mi rememoras iaman budon de AVE kun bildoj, inform-materialo kaj butonoj. Mi mendis po 20-30 da ekzempleroj de VERDire por disdoni, kaj mi kunportos la nunan materialon (AVENO, faldfolion, Gvidlinioj de la Eŭropaj Verduloj). Eble mankas pli alloga materialo por ekologi-rilata ekspozicio. Sed la pli grava problemo estas la tempo - por aktivigi la budon. Do, mi jam proponis al VEGA kaj BEMI eble kune havi budon en Tampere-o -respondo ankoraŭ mankas.
Mi informis Pekka Sauri (Estrarano de la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj), kiu vivas en Helsinki kaj petis lin viziti nian diskutrondon aŭ postan interparoladon en la angla lingvo. Helpe de Jukka eble tiu kontakto al EFVP funkcios.

**SAT:** Helpe de Alan Gould, AVE nun havas kontaktojn al SAT, Sennacieca Asocio Tutmonda.
Ili invitis nin, prezenti AVE-n je la **SAT-kongreso (15-22 de Julio) en Maribor**, Slovenio. Pri tio mi ankoraŭ serĉas ge-AVE-anon, kiu povas partopreni kaj prezenti AVE-n. Por mi mem, ĉijare, tempo (kaj mono) ne sufiĉas. Kostoj estas por aliĝo 280 (ĝis 95-01-31) aŭ 390, loĝado 500, manĝado 360 frf-oj. Mi / AVE estas preta pagi la kotizon (do, ĉ. 300 frf-ojn) por AVE-membro, kiu estas preta prezenti AVE-n kaj diskuti kun SAT rilate al kunlaboro. La raporton ni publikigos en AVENO por decidi. Mi esperas ke mi mem povos partopreni la SAT-kongreson 1996 (en Eŭropo).
Mi, kvankam membro de UEA, opinias, ke SAT eble pli rilatas al ekologia politiko ol UEA; tial mi nepre ŝatus, ke ni bone kunlaboru ankaŭ kun SAT.

---

**Okazis:**

**Baloto por la Parlamento de la Eŭropa Unuiĝo.** Bedaŭrinde en Francio la Verduloj fendiĝis kaj (verŝajne) tial iliaj kandidatoj ne sukcesis. Do, nur estas 23 da Verdaj EP-anoj. Mi kunmetas liston de ili kun adresoj kaj specialaj temoj.
Okazis referendumoj pri EU en Austrio, Finnlando, Svedio kaj Norvegio. Vi jam scias ke nur en Norvegio plimulto voĉdonis kontraŭ la EU. Do, ek de januaro '95 la EU konsistas el 15 landoj kun 367 milionoj da enloĝantoj. Kiel unu el tiuj mi scias, ke la EU-"registaro" la Konsilio de la Ĉef-Ministroj ankoraŭ ne estas sufiĉe kontrolata de la EU-Parlamento (EP). La Kontrakto de Maastricht simile donos tro grandan povon al la EU-"registaro". Mi legis, ke el la 20 komisaroj la medi-rilata komisarino ŝajnas ne sufiĉe klera en tiu ĉi fako; ankaŭ aliaj estas pridiskutendaj. Problemo estas, ke la EP nur povas akcepti ĉiujn 20 aŭ ne akcepti la komisararon entute. (Ni vidos.)
Mi opinias, ke tiu ĉi evoluo, for de la naciaj politikoj, devus rezulti en pli granda stabileco en Eŭropo.

Tamen estas preskaŭ nekredeble, kiamaniere lame agis EU en la kazo de Eks-Jugoslavio kaj nun en la Ĉeĉenia konflikto.
En **Bosnio/Kroatio/Serbio** ne temis pri oleo, do neniu vidis profiton por la engaĝiĝo; ĉu ne eblus pere de nemilitaraj metodoj helpi al solvo de la distribua problemo inter etnoj kaj religioj ? Kaj restas malsolvitaj la problemoj de Kosovo kaj Makedonio. Bone rakontas pri tio la libro de Spomenka Ŝtimec "La kroata noktmilito-libro", traduko nun ankaŭ en la germana "Kroatisches Kriegsnachtbuch", eldonejo Schöningh, 15 gmk-oj.
Je **Ĉeĉenio** temas pri oleo; unu de la hipotezoj estas, se ruslando kontrolas la oleon de ĉeĉenio ni okcidentuloj certe ricevos parton de ĝi, krome temas pri kontrolo je oleodukto el Aserbajĝano kiu trapasas Ĉeĉenion (tion asertis la historiisto Juri Affanassjev).
**Lev Kopelev** (ekzil-ruso) parolis ĉe demonstracio en Bonn (FRG) kontraŭ la milita perforto de Grosnj: ".. la murdoj en Ĉecenio ne estas enlanda afero de Ruslando ... ĉiuj devas enmiksiĝi senperforte, tamen insiste .."; kaj li menciis **Sergej Kowaljov-on**, rusa Duma-parlamentano kaj aktivisto por la Homaj Rajtoj, kiu kun aliaj veturis al Grosnj por paroli kaj raporti. Leteron kun simila teksto sendis **Helmut Lippelt** kaj aliaj germanaj parlamentanoj de Ligo 90 / La Verduloj al **Boris Jelcin**; finfine ankaŭ la germana kanceliero **Helmut Kohl** telefonis al Jelcin (kiu diras alian ol li lasas okazi (aŭ ne povas malebligi ?)). Entute katastrofo !

Certe ekzistas aliaj gravaj konfliktoj kaj subpremo de popoloj sur la tero, kiel ekz-e en **Tibeto, Orienta Timoro, de indiĝenoj** en ameriko kaj multaj afrikaj landoj. Parto de tiuj konfliktoj tre bone estas publikigataj en VERDire, Monato kaj Sennaciulo. Kaj ni scias, ke la Unuiĝintaj Nacioj klopodas helpi - espereble kun pli kaj pli bona sukceso. Restas alikaze la socialaj organizoj kiel la Ruĝa Kruco, kaj "medico" ktp. por almenaŭ helpi al la suferantaj homoj.

**38a ISO** (Internacia Seminario de la Germana Esperanto Junularo) jarfine '94/'95 en Tübingen; ĉeftemo estis **"Rubo"**; temaro de prelegoj aŭ diskutrondoj: Kio estas rubo ? Kemia Rubo. Ĉu eblas sekure stoki nuklean rubon? Rubo - Televido. Rubo en Mezepoko. Ruboprevento. Rubo - Utiligo. Rubo - Internacia fenomeno / komerco. Verdpaco (Greenpeace). Rubodeponejoj. Rubogrupo ĉe universitato ELTE Budapeŝto. Pura Produktado. Oleo el fekajdevena feĉo / industriaj ŝlimoj. Reciklado de piloj (malgrandaj baterioj). Verda Punkto (FRG). Paŝoj al (pli) malpolua socio. Filmo: "La Rubejo". Oni ankaŭ babilis kaj distris sin per kelkaj aliaj programeroj.

**Okazos (vidu ankaŭ pri kongresoj sur p-o 1):**
Ni ricevis Invitilon por **Eko-Festivalo de la Esperanto-Kanzono** kiu okazos 10a-12a de februaro en Barra do Garças (Centra Brazilio) kun eko-turismaj okazaĵoj. Organizanto: Fundacao Cultura-Ambiental Centro Oeste, Caixa Postal 246, 78.600-000 Barra do Garças MT, Brazilo. Tel:(065)-861-1227.

European Sustainable Energy Tour 1995 (**Eŭropa Turneo por Daŭrigeblaj Energioj**): Bruselo-Parizo-Londono-Nijmegen [Nejmeĥen]-Frankfurto-Prago-Vieno-Bratislavo-Kievo-Minsko-Moskvo (12a de januaro - 12 de oktobro). Temas pri piediro de 25 km tage. Organizas SNORE (Subtena reto por renovigebla energio) kaj For Mother Earth (Por Patrino Tero). Okazos ekzpozicio en akompananta kamionego por montri la eblecojn eviti nuklean energion. Fotovoltaiko, ventgeneratoro kaj sunkolektoroj donos (espereble) la necesan energion. Pliaj informoj *okcidente*: Mother Earth, Zilverhof 19, B-9000 Gent, Tel: 32/9/233 32 68, FAX: /233 49 24, e-posxto: motherearth@gn.apc.org; *oriente*: Mother Earth, Bubenska 6, CZ-17000 Praha 7, Tel/FAX: 42/2/667 10366; e-posxto: ckane@ecn.gn.apc.org.
Fonto: Grasshopper (no 3, '94),Sławkowska 12/24, (IVp.),PL-31-014 Kraków.

---

Sekretario de AVE:
Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen (Germanio).
UEA-Konto (por donacoj aŭ mendoj al AVE, kotizo estas libervola): avex-z
e-posxto: Till_Westermayer@fr.maus.de